

decembro 1968

61-a jaro

n-ro 757 (12)

esperanto

oficiala organo de

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)

nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler



NOVA ENKETO PRI LERNEJOJ

Vi trovos

en tiu ĉi fina numero de 1968 ĉefartikolon, kiu formas konvenan kulminon de nia kontribuo al la Jaro de Homaj Rajtoj 1968. La komuniko pri "La Monda Lingvo-Problemo" (p. 177) memorigas, ke per la festado de la 20-a datreveno de la Universala Deklaracio ne finiĝas nia agado sur la kampo de Homaj Rajtoj: ĝin daŭrigos ankaŭ la nova revuo "La Monda Lingvo-Problemo", kiu tuŝos ankaŭ demandojn pri lingvaj rajtoj, kaj kies unua numero eliros ĝuste la 10-an de decembro, okaze de la 20-a datreveno.

Por ke ĉi tiu ne estu nur fina numero de 1968, sed ankaŭ iomete finna numero, ni aperigas sur p. 175-6 koncizan skizon pri unu el multaj allogaj regionoj de la Kongreslando 1969.

Detaloj pri la eblaj ekskursoj por kongresanoj troviĝas en la oficiala komuniko sur p. 179.

Bildojn ni dankas al: Welt auf Reisen (p. 175-6), N. Nikolov (179) kaj Gim taekeng (180).

Enhavo

- 173 Kultura genocido kaj Homaj Rajtoj (Lapenna)
- 175 La vivo en Laponujo (Savolainen)
- 176 Turisma Akademio akceptis Esperanton
- 177 Informoj de CED
- 178 Viaj opinioj (leteroj de legantoj)
- 178 Recenzo
- 178 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj)
- 179 54-a Universala Kongreso, Helsinki, Finnlando, 1969
- 180 La Juna Vivo
- 181 Kapitalo Hodler 68: Institucio fondita
- 181 Alvoko al la Esperanto-grupoj (Carlén)
- 182 Respondo al Heroldo
- 183 Esperanto en radio
- 183 Oficiala informilo n-ro 418
- 184 Anoncetoj

PRO SPACOMANKO...

necesis ellasi el tiu ĉi numero la raporton pri la Seminario pri Modernaj Formoj de Laboro en la Nuntempa Esperanto-Movado, okazinta sub aŭspicio de UEA en Grésillon, Francujo. Konciza raporto pri la Seminario jam aperis, tamen, en "La Praktiko", novembro 1968, p. 149.

La kovrilo

José Rofes, direktoro de la lernejo San José de Calasanz en Barcelona, uzas Esperanton kiel 'komparan lingvon' dum la instruado de aliaj stud-objektoj. Tiel estiĝas natura bazo por posta plena kurso de Esperanto. Por la lerneja jaro 1968-1969, la Centro de Esploro kaj Dokumentado entreprenas novan mondampleksan enketon pri la instruado de la Internacia Lingvo en lernejoj. Detaloj aperas sur p. 177. (Foto: Hispana Esperanto-Instituto)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Redaktoro: D-ro V. Sadler.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 18,75 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 25,— gld.). Unuopa ekzemplero: 1,— gld.

Banko: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-6.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano por diskonigo de la agado de UEA: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo. **Generala sekretario** kaj estrarano pri informado kaj kongresoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

Estrarano pri turismo: S-ro M. Jaumotte, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

Estrarano pri lernejoj: S-ro J. Toczyski, skr. p. 57, Gdańsk 1, Polujo.

Estrarano pri financoj: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj: D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo.

KULTURA GENOCIDO KAJ HOMAJ RAJTOJ

Okaze de la
Jaro de Homaj Rajtoj



Babij Jar, de B. Prorokov



1968

Jaro de
Homaj Rajtoj

Du dokumentoj de unuaranga signifo el etika, politika kaj jura vidpunktoj markas la finon de la jaro 1948. La 9-an de decembro la Ĝenerala Asembleo de UN, kunveninta por tiu sesio en Parizo, unuanime akceptis la Konvencion pri Genocido, kiu poste estis ratifita de konsiderinda nombro da ŝtatoj, tiel ke al ĝi en la nuna momento entute 70 ŝtatoj apartenas kiel partioj. La sekvintan tagon, la 10-an de decembro, la Ĝenerala Asembleo akceptis per 48 voĉoj kaj 8 sindetenoj, sen unusola voĉo kontraŭ, la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj*.

Ĉu nenio farebla?

Same kiel la procesoj de Nürnberg kaj Tokio kontraŭ la militkrimulojn elvokis vastan diskuton, en kiu juraj kaj pseŭdojuraj argumentoj intermiksiĝis kun politikaj starpunktoj kaj aspiroj, tiel same la ideo mem difini genocidon kiel krimon de internacia juro kaŭzis reziston en kelkaj medioj. Ilia ĉefa argumento estis tiu jam kaduka tezo — tamen plue alloga por multaj, kiuj ne povas vidi la progreson aŭ konscie obstaklas ĝin — ke genocido ĉiam ekzistis kaj ke sekve nenio estas farebla sur tiu kampo.

Estas vero, ke agoj, hodiaŭ rigardataj kiel krimoj kontraŭ la homeco, estas verŝajne tiel malnovaj, kiel la homaro, sed ĉu tio per si mem devas signifi, ke ili estu rezignacie rigardataj kiel io neforigebla el la homa socio? La fakto,

ke jam antaŭ jarmiloj oni kutimis, laŭ la tiamaj moralaj kaj juraj konceptoj, bruligi vilaĝojn kaj urbojn, prirabi havaĵojn, sklavigi plenaĝulojn kaj infanojn, aŭ eĉ dezertigi tutajn teritoriojn, neniel signifas, ke oni rajtas senpune fari la samon en epoko kun tute aliaj konceptoj de internaciaj juro kaj moralo. Masakro sub Herodo, aŭ deportado de Judoj al Babilono, aŭ persekutoj kontraŭ Kristanoj sub Nerono, aŭ kiu ajn alia samkaraktara evento de la pasinteco, evidente ne povas pravigi similajn, aŭ eĉ pli terurajn agojn en la nuntempo.

Tio, kompreneble, ne signifas, ke tiaj abomenindaj agoj ne okazis en la moderna epoko. Ne nur, ke ili okazis, sed, eĉ pli, ili formis parton de konscie ellaborita politiko. La ekstermo de pli ol 8 milionoj da propraj kaj alilandaj civitanoj fare de la nazia Germanujo, kaj similaj praktikoj de aliaj ŝtatoj, kune kun la multnombraj internaciaj krimoj de aliaj kategorioj, faritaj dum la milito aŭ en ligo kun ĝi, estis potenca superpezo kontraŭ la pseŭdosciencaj argumentoj de la rondoj, kiuj obstaklis la difinon de genocido kiel krimo de internacia juro.

La difino de genocido

La Konvencio pri Prevento kaj Punado de la Krimo de Genocido difinas genocidon kiel krimon direktitan kontraŭ tutaj homgrupoj. Laŭ la Art. 2 de la Konvencio, genocido signifas iun ajn el la sekvantaj agoj, faritaj kun la celo detrui, plene aŭ parte, nacian, etnan, rasan aŭ religian grupon kiel tian: mortigado de la membroj de la grupo; kaŭzado de grava korpa aŭ mensa damaĝo al la membroj de la grupo; intenca altrudo al la grupo de vivkondiĉoj celantaj kaŭzi ĝian fizikan detruon plene aŭ parte; altrudo de cirkonstancoj, kies celo estas preventi naskiĝojn ene de la grupo; perforta transigo de infanoj de la grupo al alia grupo.

* En Esperanto aperis jam kvar eldonoj de la U.D. kaj nun estas preparata nova represo. Ĝia enhavo estis vaste pritraktita ankaŭ en la Internacia Lingvo per artikoloj, prelegoj kaj alimaniere. Pri la U.D. kaj la krimo de genocido vidu ankaŭ la verkon Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo, precipe pp. 73-93.

Kultura genocido

Ĉiu ajn el la menciitaj agoj estas per si mem krimo de genocido, se tiu ago estas farita kun la celo detrui plene aŭ parte la grupon kiel tian.

La projekto de la Konvencio parolis ne nur pri nacia, rasa aŭ religia grupo, sed ankaŭ pri "politika". La t.n. "politika genocido" kaŭzis grandan diskuton, ĉar pluraj ŝtatoj forte kontraŭstaris ĝin. Fine, por savi la universalecon de la Konvencio, oni rezignis pri la "politika genocido" kaj ĝi ne troviĝas en ĝi.

Aliflanke, en la projekto troviĝis ankaŭ la t.n. "kultura genocido". Ĝi estis difinita kiel krimo farita "per diversaj agoj, kiaj estas malpermeso utiligi la lingvon de la grupo en la ĉiutagaj rilatoj aŭ en la lernejoj, aŭ presigi aŭ disvastigi publikaĵojn en la lingvo de la grupo"; plue "detruado de bibliotekoj, muzeoj, lernejoj, historiaj monumentoj, lokoj de kulto kaj aliaj institucioj kaj kulturaj objektoj de la grupo, aŭ malpermeso utiligi ilin."

Spertoj sub nazia okupado

La "kultura genocido" elvokis ne malpli grandajn diskutojn, ol la "politika". Por ĝi precipe pledis la landoj, kiuj ĝin spertis sub la nazia okupado. Oni argumentis, ke ekzistas du manieroj por detrui homan grupon. La unua estas "fizika ekstermo de ĝiaj membroj"; la dua konsistas en "detruo de la specifaj trajtoj de difinita grupo" sen fizika ekstermado de la unuopaj individuoj, el kiuj ĝi konsistas. Ĉe la alia flanko troviĝis la ŝtatoj, kiuj ne deziris, ke la kultura genocido eniru la Konvencion. Iliaj reprezentantoj asertis, ke en la historio ne malofte okazis, ke unu nacio kulture englutis alian kaj ke, se oni akceptus la koncepton de kultura genocido, oni devus hodiaŭ kulpigi multajn naciojn pro ĝi. Fakte, ne tre forta pozicio, ĉar la samon oni povus diri pri kiu ajn alia formo de genocido. La plej forta argumento estis la malfacilaĵoj, kiujn kaŭzus la provoj difini la limojn de kultura genocido, kiu — oni asertis — intermiksiĝas kun la malobservo de la homaj rajtoj kaj la rajtoj de minoritatoj. Per efika protekto de tiuj rajtoj — oni promesadis — estos eble preventi en la estonteco tiujn agojn, kiujn la alia flanko deziris enmeti en la nocion de genocido. La kultura genocido fine estis malakceptita per 25 voĉoj kontraŭ 16 favore, dum la aliaj sindetenis.

Efektive, la kulturaj rajtoj, inkluzive la rajtojn de minoritatoj, estas formulitaj en pluraj internaciaj dokumentoj. La Ĉarto de UN eksplicite rekonas la principon de egaleco de ĉiuj nacioj kaj individuoj senkonsidere al diferencoj rasaj, seksaj, lingvaj aŭ religiaj. La Universala Deklaracio rekonfirmas la principon, ke ĉiuj rajtoj kaj liberecoj validas por ĉiuj homoj sen "kia ajn diferencigo laŭ....

lingvo". La Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj rekonas la rajton de ĉiu popolo "libere decidi pri... sia kultura evoluo" kaj garantias la efektivigon de ĉiuj rajtoj difinitaj en la Konvencio "sen diskriminacio... lingva". Ankaŭ la Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj eksplicite mencias la lingvan egalecon en pluraj artikoloj kaj la rajton uzi la propran lingvon kiel unu el la esencaj kulturaj rajtoj de la homo. Kvankam la menciitaj du Paktoj ankoraŭ ne ekvalidis, tamen en la Ĝenerala Asembleo ili estis akceptitaj unuanime. Tio, en ligo kun la principoj de la U.D. kaj la preskriboj de la Ĉarto, klare indikas, ke la kulturaj rajtoj, inkluzive la rajton je la propra lingvo kiel la plej esenca el ili, estas hodiaŭ ĝenerale rekonitaj.

Malgraŭ la rekono, kultura diskriminacio ĝenerale kaj precipe lingva diskriminacio abundas kaj en unuopaj landoj kaj sur internacia nivelo.

Lingva kaj kultura imperiismo

En la kadroj de unuopaj ŝtatoj, precipe en la multnaciaj aŭ en tiuj kun grandaj naciaj minoritatoj, la altrudado de unusola lingvo kiel tutŝtata, la malebleco uzi la propran lingvon en edukado, literaturo, radio, televido, antaŭ kortumoj ktp., signifas lingvan kaj kulturan diskriminacion, kiu kelkfoje atingas la formon de kultura genocido. Sur internacia nivelo la oficialigo de kelkaj lingvoj malavantaĝe de aliaj; la apliko de t.n. "laboraj lingvoj" kontraŭ la intereso de la oficialaj kaj de ĉiuj aliaj, la malegala traktado de unuopaj "laboraj lingvoj" kaj similaj negativaj fenomenoj prezentas per si mem gravan lingvan diskriminacion, kiu, eĉ se ĝi ne atingas la formojn de kultura genocido, sendube favoras ĝin kaj estas klara esprimo de imperiismo sur lingva kaj ĝenerale kultura kampo.

Kultura sinmortigo

Paralele kun la kultura genocido marŝas la kultura sinmortigo. Kiam iu popolo komencas malatenti sian kulturon, neglekti sian lingvon, eĉ honti pri la propra lingvo kaj libervole akcepti la invadon de iu fremda; kiam ĝiaj plej elstaraj sciencistoj kaj verkistoj komencas publikigadi siajn intelektajn produktojn en fremdaj lingvoj kaj ne en la propra — kaj tiaj kazoj bedaŭrinde ekzistas — tiam la koncerna popolo estas survoje al kultura morto. Se la nacioj deziras konservi sian identecon kaj per sia propra kulturo plue kontribui al la mozaiko de la monda, ili devas senprokraste trovi efikan kuracilon por eviti kulturan pereon, kaj mobilizi la fortojn por protekti sin kontraŭ la kultura genocido.

En ambaŭ kazoj unu el la plej potencaj rimedoj estas la akcepto de la Internacia Lingvo kiel politike neŭtrala instrumento de komunikado en la nuntempaj daŭre ampleksiĝantaj interŝtataj kaj interpopolaj rilatoj.

Ivo Lapenna

La vivo en Laponujo, plej norda teritorio de Finnlando

Erkki Savolainen

La konkurso plej norda de Eŭropo — eble eĉ de la tuta mondo — okazas en Finnlando en marto. La t.n. "Reĝa Konkurso de Boacoj" estas ĉiujara arango sur la glaci-kovrita lago Inari, 290 kilometrojn norde de la Polusa Cirklo. Kurejon 2000-metran oni speciale senneĝigas per potencaj veturiloj.

Kostumoj multekoloraj


Bone mi memoras mian unuan viziton al Laponujo, en la printempo de 1963. La neĝo brilis sub hela suno, kaj la konkursantoj, vestitaj per buntaj laponaj kostumoj el bluo, ruĝo, flavo kaj verdo, fulmis tra la glacia lago. Kvazaŭ saltistoj ili klinis sin antaŭen sur la skioj, tenante en unu mano la jungrimenon kaj en la alia la gvidoŝnuron. Sonoris la ridoj kaj krioj, kiam ili vete inter si urĝis la bestojn.

Kun la skiema Prezidanto

En Inari, kelkajn tagojn pli frue, mi havis la bonŝancon konatiĝi kun Yrjö Alaruikka, la direktoro de la asocio de boacaro-posedantoj. Malgraŭ 60-jara aĝo, li restas brava sportisto. Li tiam ĵus revenis el 240-kilometra skiekskurso kun la Prezidanto de Finnlando, Urho Kekkonen, kiu ĉiujare pasigas kelkajn semajnojn en Laponujo. Kun Yrjö Alaruikka mi vizitis unu el la gregejoj apud Inari, kie oni kolektas kaj disgregigas la boacojn.

La laponoj vivas preskaŭ sole nur per la bredado de boacoj. En Finnlando ekzistas nuntempe nur ĉirkaŭ 2 400 laponoj, sed ili kune posedas ĉ. 200 000 boacojn. Kvankam ili vivas plejparte kiel nomadoj en la vastaj tundroj, la popolo estas amikema kaj gastama, kun vigla bonhumoro.

Laŭ antropologoj, la laponoj estas raso aparta, kies deveno lokiĝas ie inter la mongoloj kaj difinitaj hind-eŭropaj gentoj. Antaŭ la



Meze en Laponujo oni trovas la Arktan Cirklon — kaj la buntajn laponajn popolkostumojn.

alveno de finnoj ili okupis preskaŭ la tutan Finnlandon, sed poste ili iom post iom transmigris norden por povi konservi siajn proprajn morojn kaj vivmanieron. Nuntempe ili ne plu estas grupo izolita. Motor-sledo el Kanado komencas anstataŭi la malnovajn boaco-sledojn. En unu kabano, kiun mi vizitis, transistora ricevilo disaŭdigis la plej novajn modkantojn.

La loĝantaro sesobliĝis

Laponujo estas la plej norda kaj plej vasta regiono de Finnlando. Ĝi ampleksas preskaŭ unu trionon de la lando. Sed ĝi estas ankaŭ la malplej loĝata. Tamen ĝia loĝantaro kreskas pli rapide, ol tiu de kiu ajn alia parto de la lando: dum la pasintaj cent jaroj ĝi sesobliĝis. La laponoj mem konsistigas nur 1% de la hodiaŭa loĝantaro.

La plej norda punkto de Laponujo troviĝas jam nur 2 000 kilometrojn for de la Norda Poluso. La ĉefaj urboj estas Kemi (30 000 loĝantoj) kaj la administra centro Rovaniemi (24 000 loĝantoj).

La vivo en Laponujo

(daŭrigo)

La vasta norda regiono de Finnlando proponas al vizitantoj la ĝuon de sovaĝa naturo: tundro, lagoj, arbaroj, – kaj boacoj. La plimulto da turistoj venas per aŭto, sed ankaŭ la aerlinioj proponas regulan servon por atingi la nordajn urbojn.



Turisma Akademio akceptis Esperanton

La Internacia Akademio de Turismo, kiun patronas Princo Rainier de Monako, okazigis sian ĝeneralan asembleon fine de oktobro en Monte-Carlo, sub prezido de d-ro Louis Nagel (Ĝenevo), la eldonisto de la monde konataj "Guides Nagel".

La konsilantaro de la Akademio unuanime akceptis Esperanton por sia internacia "Vortaro de Turismo" kaj decidis, ke laboru sub la prezido de d-ro Hj. Unger (Zürich) malgranda lingva komisiono, kiu preparos la Esperanto-tradukojn por tiu faka vortaro. Poste tiun decidon konfirmis — same unuanime — la ĝenerala asembleo.

Plurjara persista agado

Tiu sukceso rezultis el plurjara persista agado de d-ro Hj. Unger, membro de UEA, ĉefredaktoro de svisa turisma revuo kaj korespondanta membro de la Akademio de Turismo, sed ankaŭ el la pozitiva sinteno de s-ro Arthur Haulot, ĝenerala komisaro de la belga turismo.

Sub la prezido de s-ro Haulot la konsilantaro de la Akademio jam antaŭ du jaroj decidis enketi pri la situacio de Esperanto en la internacia turismo. La decido enkonduki Esperanton en la turisman vortaron de la Akademio (la plej alta kultura instanco de la monda turismo) estas bazita sur la rezultoj de tiu enketo.

En multaj partoj de Laponujo oni kreis natur-konservejojn, kie ankoraŭ eblas admirati la virgan sovaĝecon de la naturo. Oni konstruis ankaŭ vintro-sportajn centrojn, kiujn vizitas skiemuloj el la sudo dum la fino de la vintro kaj dum la printempo. Ankaŭ en somero la hoteloj kaj gastejoj de Laponujo akceptas amason da turistoj. La plimulto da ili venas aŭte — en la pasintaj 15 jaroj oni konstruis 1500 kilometrojn da ŝoseoj en Laponujo — sed nuntempe ankaŭ per aviadilo venas granda nombro. Ekzistas jam regulaj servoj inter Helsinki, unuflanke, kaj Kemi, Rovaniemi kaj Ivalo aliflanke.

Sezono de "blankaj noktoj"

La lapona somero daŭras ĉirkaŭ 120 tagojn. Ĝi estas la sezono de la noktomeza suno kaj la "blankaj noktoj", ĉar, eĉ tiam, kiam la suno efektive subiras, ĝi apenaŭ malaperas sub la horizonto. Rovaniemi, ĉe la Polusa Cirklo, havas ĉ. 3 semajnojn sen mallumo. Muonio havas preskaŭ 2 monatojn, kaj Utsjoki, en la ekstrema nordo, ĝis 70 tagojn.

Someraj laboroj en Laponujo

En somero la popolo laboras kiel terkulturistoj kaj bredistoj. Necesas rikolti furaĝon por la longaj vintraj monatoj, kiam la bestoj ne eliras. La somero permesas ankaŭ prilabori novan teron, ĉar la limon de la kulturata tero oni etendas ĉiam pli norden kaj nord-oriente.

Kaj unu alia grava tasko restas antaŭ la rekomenco de la vintra laboro arbarista: necesas kontroli la tutan boacaron kaj marki la idojn naskitajn dum la somero.

(Fonto: Unesco Features)

INFORMOJ DE

CED

**CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO
PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO**

**77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo. Telefono (01) 904 9081.**

Komuniko pri „La Monda Lingvo-Problemo”

Kun fiero kaj plezuro CED anoncas, ke, post pli ol unujara preparlaboro, la 10-an de decembro 1968 aperas la unua numero de la nova revuo "La Monda Lingvo-Problemo".

La unua numero enhavas jenajn artikolojn: Victor Sadler: Editorial; Ivo Lapenna: La situation juridique des "langues officielles" avant la fondation des Nations Unies; Arthur Capell: The limits of second language learning; J. B. Rudnycky: Linguizid: Ein Beitrag zur Soziolinguistik; M. van Haegendoren: The origins of the language shift in Flanders; Théodore Gutmans: L'interprète de conférence dans le monde moderne; R. L. Harry: The language problem in diplomacy. Al ĉiu artikolo estas aldonita ampleksa resumo en Esperanto. Tiu ĉi numero, krome, enhavas plurajn mallongajn informojn kaj notojn pri la aŭtoroj.

Mondkonataj specialistoj

La Redakta Komitato de la revuo estas tre internacia laŭ karaktero kaj konsistas el C. J. Adcock, G. Bárczi, C. C. Berg, E. A. Bokarev, A. Capell, V. Georgiev, Z. Klemensiewicz, I. Lapenna, B. Migliorini, M. Pei, G. Waringhien, E. Wüster. La ĉefredaktoro estas d-ro Victor Sadler. La membroj de la Redakta Komitato estas mondkonataj specialistoj en siaj respektivaj fakoj: psikologio, lingvistiko, antropologio, internacia juro, filologio, leksikologio, terminologio kaj dokumentado. Ĝis nun 32 konataj fakuloj jam verkis aŭ promesis verki studojn kaj aliajn kontribuojn por la revuo. La konsisto de la Redakta Komitato kaj de la kunlaborantoj garantias enhavon de plej alta nivelo.

La revuon eldonas la renoma firmo Mouton & K-io, Hago-Parizo, kiu jam eldonas tutan aron da elstaraj revuoj kaj verkoj. La revuo aperadas sub la aŭspicio de CED, kiu konservas la kopirajton de la titolo kaj de la tuta enhavo. La fakto, ke Mouton & K-io estas la eldonisto, donas al la revuo plian prestiĝon.

Tiu ĉi numero havas 64 paĝojn en formato de 23 x 17 cm; la papero kaj kovrilo estas luksaj. La revuo aperados tri fojojn jare, do ĉiun kvaran monaton, en la samaj amplekso kaj formato. En ĝi estos publikigataj artikoloj, notoj kaj informoj pri ĉiuj aspektoj de la lingva problemo, kiel indikas la subtitolo: socia,

lingvistika, politika, jura, psikologia, ekonomika. Laŭ sia enhavo ĝi estas absolute unika en la mondo. La artikoloj aperos en diversaj naciaj lingvoj (angla, franca, germana, hispana, rusa k.a.), ĉiam kun ampleksa resumo en la Internacia Lingvo. Tio ebligas, ke la revuon povas aboni ne nur diversaj institucioj interesiĝantaj pri la demandoj traktataj en la revuo (bibliotekoj, universitatoj kaj fakultatoj, institutoj, internaciaj organizaĵoj kaj similaj instancoj), sed ankaŭ individuoj ne sciantaj tiun aŭ alian nacian lingvon, sed parolantaj la Internacian Lingvon.

Malgraŭ la amplekso kaj vere luksa ekstera aspekto, la abonprezo por unu volumo, nome por la jarkolekto 1969 de 3 numeroj po 64 paĝoj, estas nur 25 guldenoj, 7 USA-dolaroj, 2-18-0 anglaj pundoj, 34 fr.fr., 28 DM aŭ egalvaloro. Oni abonas aŭ ĉe CED, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando aŭ ĉe Mouton, P.O. Box 1132, Den Haag, Nederlando. CED aparte atentigas, ke la Fondaĵo kolektita por la revuo garantias ĝian regulan aperadon dum minimume du jaroj. Kompreneble, se la nombro de abonantoj estos kontentiga, la revuo aperados ankaŭ post tiu minimuma kaj garantiita periodo.

CED estas konvinkita, ke la revuo efike plenumos la taskon, por kiu ĝi estas eldonata, nome, celtrafe atingi la ŝlosilajn poziciojn de la publika vivo en mondaj kaj landaj kadroj por prezenti la hodiaŭan lingvan problemon kaj la solvon, kiu altrudiĝas per si mem.

CED esperas, ke ĉiuj seriozaj studentoj de la problemo ne nur abonos la revuon, sed ankaŭ vaste utiligos ĝin por prezento de la lingvo-problemo sur scienca nivelo. Necesas, ke la revuo troviĝu en ĉiu pli granda biblioteko, en ĉiu iom grava universitato, en institutoj pri lingvoscienco, filozofio, politiko, juro ktp., ĉar nur tiamaniere povos esti atingita la celo. Legantoj en publikaj bibliotekoj aŭ personoj, kiuj laboras en tiaj institutoj aŭ institucioj, postulu, ke la koncernaj bibliotekoj aŭ instancoj abonu la novan revuon. Kun la helpo de ĉiuj, kiuj komprenas la eksterordinaran gravecon de "La Monda Lingvo-Problemo", ĝi tutcerte baldaŭ ekludos sian pozitivan rolon.

Lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata en 1968/69

CED entreprenas novan enketon pri la instruado de la Internacia Lingvo en lernejoj en 1968/1969. Tiun gravan taskon, kiun pli frue plenumis por CED s-ro Kennedy, poste s-ro Olle Olsson en la nomo de CED kaj de ILEI, nun transprenis s-ro Helmut Sonnabend. La 19-an de oktobro, 1968, okazis en CED konferenco inter la direktoro de CED, s-ro Markarian kaj s-ro Sonnabend. Dum tiu kunvido oni, interalie, pritraktis la tekston de la nova demandaro. Oni simpligis ĝin ĝis maksimumo por ebligi, ke absolute ĉiuj geïnstruistoj, kiuj instruas la lingvon en tiu ĉi lerneja jaro, povu respondi praktike sen perdo de tempo.

S-ro H. Sonnabend jam dissendis al la lernejoj, en kiuj, laŭ la antaŭaj statistikoj, la lingvo estis instruata, tiun simplan demandaron, kaj CED insiste petas la geinstruistojn senprokraste respondi kaj resendi la plenigitan demandaron al la adreso: *S-ro Helmut Sonnabend, Echtersfeldkamp 11, Dollbergen 3161, Germanujo*. La geinstruistoj, kiuj ne ricevis la demandaron, bonvolu ĝin peti tuj de s-ro H. Sonnabend.

Necesas, ke la statistiko estu kiel eble plej kompleta, ĉar nur tiamaniere ĝi entute havas sencon. La rezultoj de la enketo estos publikigitaj en formo de statistika trarigardo kiel aparta dokumento de CED. Tiu dokumento estos poste utiligita por la nova klopodo vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj, eventuale per Interŝtata Konvencio. Krome, ĝi estos unu el la bazaj dokumentoj de la Tria Lerneja Konferenco, kiu verŝajne okazos tuj post la Universala Kongreso en Helsinko. Pri tio aperos aparta komuniko post la esploro de eblecoj.

CED varme petas ĉiujn geinstruistojn doni helpon al s-ro H. Sonnabend, por ke li povu plenumi ĝustatempe tiun gravan taskon.

Donacoj

En la lasta tempo CED denove ricevis plurajn donacojn. Pro manko de spaco la listo de donacintoj aperos en la januara numero.

VIAJ OPINIOJ

Skribas Jussi Jäntti (Finnlando):

Unu el la plej gravaj problemoj de la Esperanto-movado estas: kiel intensigi eldonaktivadojn. Estas dekmiloj da publikaj bibliotekoj, kiuj povas aĉeti librojn, se nur iu proponas tion. Tamen, simpla peto, ke ili mendu Esperantan literaturon, ne efikas; oni devas proponi difinitan bonan libron, menciante la aŭtoron, eldoniston, eventuale ankaŭ eldonlokon kaj jaron. Same la bibliotekoj abonas revuojn.

Nun antaŭ la jarŝanĝo ĉiu devus provi abonigi sian proksiman bibliotekon al la revuo "La Monda Lingvo-Problemo", kiu influos multe opiniojn rilate la komprenon de la solvo, kiun Esperanto prezentas.

Skribas S. R. Dalton (Leeds):

Gratulon pro la trafa kovrilo de la oktobra numero de "Esperanto". Kun nacilingvaj tekstoj ĝi formus bonegan bazon por moderna afiŝo aŭ flugfolio. Ĉu ni rajtas tion atend-esperi?

Respondas la redaktoro:

Eble interesa sugesto por la Landaj Informaj Fakoj?

Tentaj versoj hispanaj



Recenzas F. de Diego (Hispanujo):

Liriko, de Federico García-Lorca. El la hispana tr. K. Gusev. Moskvo: Komisiono de sovetaj esperantistoj, 1968. 78 p. Ofset. 21 cm.

La ŝajna facilo de la versoj de García-Lorca aparte tentas la tradukistojn. S-ro Gusev faris atentindan provon en Esperanto kaj per *Liriko* li prezentas, interalie, preskaŭ la tutan, faman *Romancero Gitano*. Lia provo montras, precipe, ke la hispanan poeton oni povus transverŝi en Esperanton, ke eblus transbriligi almenaŭ grandan parton de lia lumo.

S-ro Gusev ne trafas ĉiun ĝustan klavon. Unue, li ne plene posedas la hispanan. Ekzemple, en la du lastaj versoj de paĝo 32 vidiĝas, ke li ne komprenis la hispanaĵon *mata de pelo* (hararo). Due, li tenas sin tro strikte al la karakteraĵoj de la *romance*, tiel pri la asonanca, alterna rimo, kiel pri la libera ritmo. Tia ritmo, bela en la hispana, iom ŝokas la esperantistajn orelojn, des pli, ke ĝi ne apogiĝas sur puraj rimoj.

Gramatikaj eraroj kaj neklarigitaj neologismoj krome makuletas la cetere salutindan provon de s-ro Gusev. Ĉu li plene trafos en eventuala, dua provo? Tion ni deziras.

Mendu ĉe UEA: 1,80 gld. / 7,2 st.; sendokostoj 10 %.

Laste aperis...

Fine atingis nin la de jaroj anoncita libro el Albanujo, "Gjergj Kastrioti-Skanderbeg, nacia heroo de Albanio", eldonita pasintjare en Tirana. Mendebila ĉe UEA, 3,50 gld. Biografietoj de argentinaj kaj urugvajaj esperantistoj troviĝas en modestaspekta multobligajo "Ekflorado ĉe Plata-rivero" de F. Ken (1,— gld.).

Bazajn geografiajn sciojn pri la kongreslando '69 oni povas ĉerpi el bela broŝureto "Rigardu Finnlandon", eldonaĵo de la eksterlanda ministerio en Helsinko. Se interesas vin zoologio kaj botaniko, interesos vin la detalaj priskriboj en "Bestkalendaro" (4,50 gld.) kaj "Kolora florkalendaro" (2,25 gld.), jam aperintaj por 1969.

Al kursestroj neniam sufiĉas la provizo de legolibroj. Ili bonvenigos do la novan "Interesa

legaĵo", 124-paĝan kompilaĵon de Aleš Berka eldonitan en Vsetín, Ĉeĥoslovakujo.

Fakvortaro 576-paĝa

Eldonejo Terra en Budapeŝt ĵus elsendis dikan poŝvortaron, "Esperanta-hungara / hungara-Esperanta turista vortaro" de Alfonso Pechan. Kontrolis ĝin tiu eminenta turisto, prof. K. Kalocsay. Ĝiaj 576 paĝoj helpas egale ali-landajn turistojn en Hungarujo kiel ankaŭ hungarojn en eksterlando.

"Orjubileo de Skolta Esperantista Ligo" (15 p., 2 steloj afr.) kaj la Broŝuro n-ro 2 de Programo "Pasporto" de TEJO registras kelkajn el la progresoj de la junulara movado.

Fremdlingvaj Eldonejoj senlacaj

La Fremdlingvaj Eldonejoj en Hanojo kaj Pekino ne ĉesas aktivi. La ĉi-monata rikolto: du pliaj milittempaj verkoj de Maŭ zedong kaj 60-paĝa vjetnama broŝuro "Antaŭen sub la glora standardo de la oktobra revolucio".


Mendojn de novaj eldonaĵoj oni bv. adresi al la Libroŝerbo de UEA. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki prezon en guldenoj aŭ steloj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.

MARGRET NIKOLOVA

kantas "La amo de la
junmaristo" kaj
"Ropotamo" en la vigle
aĉetata bulgara disko
"Ĉiun someron"
recenzita en nia
oktobra numero.
Ĝi kostas: 12,- gld.
(48 st.) plus afranko.
Diametro: 26 cm.
Rapideco: 33 r/m.
Kodnumero: BTH 721.



KONGRES-EKSKURSOJ JAM FIKSITAJ



54-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Helsinki, 26 julio - 2 aŭgusto 1969

Alta Protektanto: D-ro Urho Kaleva Kekkonen, Prezidanto de Finnlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Ekskursoj.

Antaŭ la U.K. ekskursoj okazos al: a) Orienta Laga Regiono (22-25 jul.). Prezo: 312,— gld., ĉion inkl.

b) Laponujo (23-25 jul.). Prezo 385,— gld., ĉion inkluzive.

Dum la Kongreso okazos tuttagaj ekskursoj al:

a) Porvoo — Prezo 20,— gld.

b) Lahti — Prezo 30,— gld.

c) Hämeenlinna — Prezo 35,— gld.

En pluraj tagoj dum la Kongreso okazos ekskursoj en Helsinki:

a) per aŭtobuso (dumtage) — Prezo 10,— gld.

b) per ŝipo (vespere) — Prezo 8,— gld.

Post la Kongreso okazos neoficiala ekskurso al:

a) Leningrad (3-6 aŭg.). Prezo 383,— gld., ĉion inkluzive.

Detaloj kaj mendiloj troviĝos en la Dua Bulteno, kiun ĉiu aliĝinto ricevos en decembro 1968.

Oficiala Postkongreso

okazos en Turku de la 2-a de aŭg. ĝis la 6-a de aŭg. Prezo: 155,— gld., ĉion inkluzive. Detaloj kaj mendilo en la Dua Bulteno.

Loĝado.

La prezoj por loĝado estas la jenaj:

Komuna Loĝejo (plurlitaj ĉambroj): de 6 ĝis 9 gld.

Kategorio "Turista" de 9 ĝis 21 gld.

Kategorio Dua de 11 ĝis 29 gld.

Kategorio Unua de 25 ĝis 47 gld.

Kategorio Luksa de 33 ĝis 46 gld.

Detaloj kaj mendilo troviĝos en la Dua Bulteno.

Infana Kongreseto.

La 11-a Internacia Inf. Kongr. okazos en la kadro de la 54-a UK. Aliĝkotizo: 50,— gld. Aliĝiloj riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Statistiko (ĝis 30/10/1968).

Arg. 1, Aŭstral. 4, Aŭstr. 1, Belg. 4, Braz. 2, Brit. 20, Bulg. 10, Ĉeĥ. 2, Danl. 4, Finnl. 23, Franc. 26, Germ. 9, Grek. 1, Hisp. 6, Hung. 5, Isr. 1, Ital. 7, Jap. 3, Jug. 11, Kan. 1, Ned. 17, Norv. 4, Nov-Zel. 1, Poll. 4, Port. 2, Sov. 1, Sudano 1, Sved. 13, Svis. 4, UAR 2, Usono 10. Entute 200 el 31 landoj.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

LA JUNA VIVO



**Oficiala organo de TUTMONDA
ESPERANTISTA JUNULARA
ORGANIZO.**

**Respondekas: Robert Lloancy,
LJV, rue de la Marinade,
F-66-Tresserre, Francujo.**

ĈIAM PLI MULTNOMBRAJ!

El la lastjara raporto de la TEJO-estraro ni povas eltiri kelkajn ciferojn, kiuj montras la konstantan kreskon de la membro-nombro en la Landaj Sekcioj de la Organizo. En la daŭro de unu jaro, envenis en niajn kadrojn pli ol 3200 gejunuloj (de 6137 ĝis 9376). Krome 1200 junaj geesperantistoj estas organizitaj en sekcioj ĝis nun ne aliĝintaj al TEJO. Tamen estas memevidente, ke multaj gejunuloj restas ekster la kadro de la LS, se ne, la membronombro de la Organizo povus superi 12000. Plej signifaj kreskoj estas rimarkeblaj en Pollando, nun la plej multnombra sekcio (2600); kaj en Koreujo (de 20 ĝis 230). Sed ĉu kresko de la membro-nombro paralelas kun financa plifortiĝo? La varbkampanjo lanĉita dum la lasta TEJO-kongreso en Tarragona celas akordigi la du nivelojn. Por tion fari necesas ĝenerala kresko de individuaj membroj de UEA en la junularaj kategorioj. Varbi individuajn membrojn, jen la grava helpilo!

LA NEJO-KOMISIONO DAŬRE AKTIVAS:

Dum la lasta somerperiodo, la NEJO-anoj kiel kutime aktivis en la muelejoj de metilerantoj; ĉi-jare en Malval (Francujo). Gvidis la Esperanto-kurson Marie-Jeanne Leroux, kiu, malgraŭ kelkaj malfacilaĵoj, sukcesis interesi la tieajn gejunulojn pri la praktikaj atingoj de la lingvo. Alia kurso okazis en Vaals (Nederlando). Tie ankaŭ la rezulto estas evidenta, la Esperanto-instruanto estis s-ro Asger Petersen el Danlando.

La NEJO-komisionanoj renkontiĝis en Bruselo dum aŭgusto por elsuĉi konkludojn el la 4-jara ekzistperiodo kaj por diskuti la vojon al firma stabiligo. Fakte la laboron grandparte

faras nur kelkpersona stabo, kio kaŭzas amasigon de la ŝarĝoj. Raciigo de la laboro montriĝis necesa kaj ankaŭ disdivido de la taskoj kun aliaj novuloj. Homoj, kiuj ŝatas serioze labori, petu informojn ĉe Hans Bakker, Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z.

Dume, la kontaktoj plifirmiĝas inter tiu interrilita komisiono kaj kelkaj NeEsperantistaj Junularaj Organizoj. Interalie kun la junulara sekcio de Mondfederalista movado, kies nova sekretario pli favoras al Esperanto. Ekstis skizo de reciproka partoprenado en la aranĝoj de ambaŭ movadoj kaj plano pri reciproka agado en la venontaj jaroj.

La laboro de la NEJO-komisiono de TEJO montriĝas por la LS bazo de komuna agado. Itala Esperantista Junularo kun Germana Esperantista Junularo lanĉis en Italujo la enketon pri lingvo-problemo en la NeEsperantistaj Junularaj Organizoj. La tuja rezulto estas prezenti la solvon de Eo al tiuj internaciaj asocioj. Materialo kaj informoj estas je la dispono de la Landaj Sekcioj ĉe: U-J. Moritz, 5161 Merken, Andreasstr. 57, FR Germanujo, kaj M. La Torre, Via Ugo De Carolis 119/7, 00136 Roma, Italujo.

SKISEMAJNOJ DE ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ

Ĉi-somere ekestis kontrakto inter TEJO kaj la junulara sekcio de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Post tiu kontrakto, la rilatoj inter ambaŭ Asocioj pli fortikiĝos kaj la laboroj kunligiĝos.

Se vi volas praktike efektivi tiun interkonsenton, partoprenu la skisemajninojn en la montara regiono Werfenweng apud Bischofshofen (Aŭstrujo), kiuj okazos respektive la 15an-22an/II/1969 kaj la 22an-1an/III/1969. Informas, kontraŭ respondkupono, la organizanto: s-ro Johann Geroldinger, Marcusgang 7, A-4020 Linz (Aŭstrujo).

ESPERANTO EN JAPANUJO

La junulara Esperanto-movado en Japanujo, precipe en studentaj medioj, estas tre aktivema. En 70 universitatoj kaj kolegioj tra la tuta lando funkcias oficiale agnoskitaj studentaj Esperanto-klubo. Regula fenomeno en la japana junulara movado estas la t.n. kunvivadoj, kiam renkontiĝas pluraj dekoj da gejunuloj por komune utiligi Esperanton kaj por plibonigi sian lingvoscion dum difinita periodo. Ekzistas fortaj lokaj grupoj, kaj federacioj de grupoj en certaj regionoj. Tutjapana Ligo de Altlernejaj Esperantistoj estis fondita lastatempe, ĝi kunligas proksimume 50 altlernejojn.

Sekve de tiu oficiala agnosko f-ino Mucuko Suzuki, studentino de la humanisma fakultato de Tokia Urba Universitato, diplomiĝis per disertacio pri la temo "Historio de la Japana Esperanto-Movado".

Sub ĉi tiuj tendoj troviĝas membroj de Korea Esperanto-Junularo. Dum la kampado, kiun partoprenis 28 KEJ-anoj dum 3 tagoj, oni uzis nur Esperanton.



Kapitalo Hodler 68:

Institucio fondita

La kapitalo planita por konstante subteni la financon de UEA — pri kio aperis jam diversaj artikoloj en la revuo "Esperanto" kaj aliaj gazetoj — ricevis firman bazon. Por ĝi estas fondita aparta institucio kun propra statuto, oficialigita per notaria akto de la 28-a de oktobro 1968. Tio garantias maksimuman sekurecon por la pruntitaj sumoj. La institucio havas juran personecon en Nederlando.

La estraron de la institucio — tri ĝis kvin personoj — nomas la Estraro de UEA. En la komenca estraro estas nomitaj: S-ro E. L. M. Wensing, prezidanto; S-ro Jaumotte, vic-prezidanto/sekretario; S-ro E. J. Woessink, kasisto. La ĉiutagan laboron ligitan al la mastrumado de la kapitalo faras administranto. En tiu funkcio estas nomita f-ino M. H. Vermaas.

Kian renton ĝi pagos?

Ekzistas pruntoj senrentaj (daŭro 6 jarojn) kaj pruntoj je rento de 2% (daŭro 10 jarojn). Tiu rento estos kalkulata ekde la unua tago de la monato, kiu sekvas la monaton, en kiu la institucio estas ricevinta la sumon de la prunto. Post fino de la jaro, en kiu la prunto estas ricevita, la rento pri tiu jaro estos kalkulita, kaj poste ĝi estos kalkulata laŭ la kalendara jaro, ĉar la administra jaro de la institucio estas la kalendara jaro.

Ĉiu pruntanto ricevos oficialan dokumenton, per kiu la institucio rekonas la ŝuldon al la koncerna persono aŭ instanco. Krome, ĉiuj

pruntantoj, same kiel ĉiuj donacintoj de 500 gld aŭ pli, ricevos ĉiujare raporton pri la agadoj kaj financa mastrumado de la institucio.

Jam 123 000 certigitaj

Ĝis nun, pruntoj ĝis ĉ. 78 000 gld. kaj donacoj ĝis ĉ. 45 000 gld. jam estas certigitaj. Ĉiuj, kiuj promesis pruntojn, sed ankoraŭ ne sendis ĝin, estas invititaj nun transigi la koncernan sumon. La institucio jam havas propran bankkonton: n-ro 25.50.51.816/824 ĉe la banko Mees & Hope, Rotterdam, je la nomo "Stichting Hodler 68". Oni ankaŭ povas sendi la sumojn je la nomo de UEA al la konataj kontoj de UEA: banko Mees & Hope, Rotterdam; pĉk. 37 89 64 Nederlando; pĉk. 74374 Svedujo; pĉk. 12-2310 Svislando ktp. El tiuj kontoj la sumoj estos tuj transigitaj al la Institucio Hodler 68.

Donacoj malgrandaj kaj grandaj

Ni varme rekomendas al ĉiuj legantoj de tiuj ĉi linioj esplori, ĉu ili havas eblecon partopreni en la Kapitalo Hodler 68, ĉu per prunto de 1000 gld., ĉu per donaco aŭ donaceto je iu ajn valoro. La donacoj ĝis nun ricevitaj varias de kelkaj guldenoj ĝis kelkaj miloj da guldenoj. Ĉiuj estas same alte aprezataj. Per partopreno aŭ kontribuo oni efike helpas al plisolidigo de la financa bazo de UEA, kiu estas la spino de ĝia agado por la plivastigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Ne estas limdato por partopreni la kapitalon, sed ju pli frue estos atingita la celita sumo de 500 000 gld (2 000 000 steloj), des pli forta estos la apogo al UEA. Anticipe varman dankon al ĉiuj!

M. H. Vermaas,
Administrantino

Alvoko al la Esperanto-grupoj



La 16 - 22-an de februaro ni festos Semajnon de Internacia Amikeco.

Pri la celoj de la Semajno vi certe jam legis aŭ aŭdis: Fari la ideon pri amikeco trans limoj naciaj, rasaj, lingvaj, politikaj kaj religiaj vivanta al ĉiuj homoj. Tio estas ja la baza ideo de Esperanto. Samtempe ni volas fari Esperanton pli konata inter ĉiuj homoj kaj en tute alia maniero. Ni ankaŭ volas krei belan tradicion inter la esperantistoj ĉirkaŭ la Semajno.

Por realigi tion ni petas ĉiun grupon aŭ lokan societon de esperantistoj en la tuta mondo aranĝi festan kunvenon por siaj membroj jam la 15-an de februaro en la vespero. Ni proponas interalie jenajn erojn en la programo: Komuna manĝado; skribado de karto al geamikoj en aliaj landoj (kun multaj subskriboj). Uzu prefere por tio la t.n. amikokartojn kun la emblemo. Tiaj estos haveblaj

interalie per la libroservo de UEA.

Ni festu la Semajnon sub la devizoj: *Amikeco trans limoj* kaj *Amikeco faras vivon pli riĉan, tial ni kulturu ĝin per afableco*.

Bona ideo estas ĝemeliigi vian societon kun unu aŭ du Esperantaj societoj eksterlandaj ĝis Semajno de Internacia Amikeco. Oni ofte ĝemeligas urbojn. Kial ni, kiuj ne havas inter ni lingvajn malfacilaĵojn, ne eluzu la belan penson pri ĝemeligado inter niaj societoj. Tio povus aktivigi la societojn kaj grupojn kaj iom fariĝi interesa ĉeno de kontaktoj per Esperanto tra la tuta mondo. Pri la laboro inter ĝemeligitaj societoj ni skribos artikolon en Revuo Esperanto (kun peto pri represado en la Esperanta gazeto).

Por Semajno de Internacia Amikeco:

Erik Carlén,
Hällabrottet, Svedujo

RESPONDO AL HEROLDO

Ĉu estas vere, ke UEA procesas kontraŭ Andreo Cseh? Ĉu estas vero, kion skribas "Heroldo de Esperanto" pri tio? Per sia letero de 21 oktobro 1968 la vic-prezidanto de UEA s-ro E. L. M. Wensing skribis al la redakcio de tiu gazeto por korekti la informon aperintan en ĝia n-ro 14 (1459) de 16 oktobro 1968, sur la paĝo 2. Kredante, ke ankaŭ la membraro de UEA deziras esti korekte informita pri tiu bedaŭrinda afero, ni presas ĉi-sube la informon de "Heroldo de Esperanto" kaj la respondon de UEA.

Tiel skribis "Heroldo de Esperanto":

Proceso kontraŭ S-ro Cseh. La informo pri proceso inter S-ro Cseh kaj la Estraro de UEA koncerne la eldonon de "La Praktiko" estas konfirmita. Ĝi daŭras jam tri jarojn. En la komenco la Estraro postulis de S-ro Cseh pagon de 54.000 gld., sed tiu sumo estas lastatempe reduktita al 12.000/15.000 gld. En 1967 la Komitato petis D-ron Herrmann trovi solvon intertrakte kun S-ro Cseh, sed bedaŭrinde D-ro Herrmann mortis antaŭ ol finplenumi sian mandaton.

Kaj tiel respondis UEA:

Estimata Redakcio,

En via numero 14 de la 16-a de oktobro vi grave misprezentas al via legantaro la situacion koncerne "La Praktiko". Ĉar verŝajne multaj el viaj abonantoj ne konas la veran staton de tiu ĉi afero, mi resumu mallonge la faktojn.

La 7-an de aprilo 1964 S-ro Cseh subskribis oficialan interkonsenton faritan inter UEA kaj Universala Ligo/Internacia Esperanto-Instituto, en kiu estas dirite i.a.:

....ke la menciitaj partioj interkonsentas, ke la monata revuo "La Praktiko" fariĝas proprietaĵo de UEA kun retrovalidiĝo ekde la 1-a de januaro 1964.

....ke ĉe UEA estos farata kuranta konto pri ĉiuj financaj operacioj inter IEI/UL kaj UEA kaj ke kiel antaŭpagon por la kostoj ligitaj al la eldono de "La Praktiko", IEI/UL verŝos antaŭ la 1-a de majo 1964 la sumon de 4000 guldenoj en la konton de UEA kaj poste ĉiumonate 1000 guldenoj ĝis la momento kiam la tuta financa administrado estos transigita al UEA.

Laŭ tiu ĉi interkonsento S-ro Cseh pagis al UEA 4000 guldenojn kaj poste, dum kvin monatoj, po 1000 guldenoj, do entute 9000 guldenojn. Post tiuj pagoj li ĉesis pagi sed ne transdonis al UEA la urĝe bezonatajn financajn kaj administrajn informojn. Se UEA estus ricevinta ĉiujn informojn de S-ro Cseh pri abonantoj, ricevita abonkotizoj ktp., ĝi estus povinta fari la finkalkulojn sufiĉe baldaŭ. Multaj abonantoj daŭrigis la abonpagojn al

IEI aŭ UL, ĉu rekte al Hago, ĉu per verŝo de la abonprezo je la eksterlandaj poŝtkontoj de UL.

Malgraŭ pluraj diskutoj, admonoj, leteroj ktp. ne montriĝis eble kontentige likvidi la aferon kun S-ro Cseh, tiel ke fine, en majo 1966, mi skribis al S-ro Cseh ke bedaŭrinde UEA sentas sin devigita meti la bonordan likvidon de la afero "La Praktiko" en la manojn de advokato, ĉar supozeble li (S-ro Cseh) neniel intencas plenumi siajn kontraktajn devojn. Li ĉesis sendi al UEA la novajn abonlistojn, li ĉesigis jam antaŭ tre longe la ĉiumonatan pagon de 1000 guldenoj, la de li ricevita abonkotizoj restas blokita je liaj kontoj, tiel ke UEA devis publikigi sufiĉe grandan deficiton kaŭzitan de la eldono de "La Praktiko". Ĉar la Estraro de UEA ne povas tion pravigi antaŭ la Komitato, UEA devas, je sia granda bedaŭro, klopodi havigi al si per juraj rimedoj tion, kio rajte apartenas al ĝi.

Por via informiĝo estu aldonite ke dum la jaro 1964 UEA sendis la revuon al 1825 abonantoj je prezo de po 8 guldenoj, tio estas 14.600 gld. UEA ricevis nur 446,72 gld. de abonantoj, do ĉiuj aliaj evidente pagis rekte al Hago (S-ro Cseh) aŭ al eksterlandaj kontoj de UL/IEI. Ĉar UEA dum la tuta jaro 1964 pagis ĉiujn kostojn de presado, kliŝoj, afrankoj ktp., estas logike ke UEA rajtas ankaŭ kolekti la abonkotizojn. Restis do sumo de 14.153,28 el abonantoj, kiujn UEA ne ricevis. Ĉar S-ro Cseh pagis al UEA sumon de 9000 guldenoj, laŭ la interkonsento de la 7-a de aprilo 1964, la fina ŝuldo de S-ro Cseh al UEA, por la jaro 1964, estis 5.153,28 guldenoj.

Dum la jaro 1965 UEA sendis la revuon al 1836 abonantoj je prezo de po 10 guldenoj (gld. 18.360). UEA ricevis abonkotizojn de entute gld. 10.890,—, do verŝajne gld. 7.470 estis pagitaj rekte al UL/IEI.

En la jaro 1966, la plej multaj abonantoj jam sciis ke estas necese pagi rekte al UEA la abonkotizon, tiel ke por tiu jaro la diferenco estis nur gld. 2.854,28.

Por la jaroj 1964, 1965 kaj 1966, la totala sumo de abonkotizoj ne ricevita ĉe UEA estas gld. 15.477,56 kaj tio estas precize la sumo kiun UEA rajte postulas de S-ro Cseh.

Neniam UEA postulis de S-ro Cseh sumon de 54.000 gld. kiun vi mencias en via gazeto, kaj mi demandas al mi el kia fantazia cerbo tiu cifero elsaltis.

Jam plurfoje Heroldo silente aŭ brukrie riproĉis al UEA ke ĝi procesis kontraŭ alia persono, kiun ĝi nomis "meritplena pioniro", sed prisilentis, ke tiu persono alproprigis al si konsiderindan UEA-havaĵon, kiun li obstine rifuzis redoni al la Asocio. Diference de tiu persono, S-ro Cseh sendube havis grandajn meritojn. Tial, ankaŭ la Estraro de UEA profunde bedaŭras ke ne montriĝis eble alimaniere solvi la aferon. Sed UEA jam ekde la 1-a de

januaro 1964 eldonas "La Praktikon" je propraj kostoj kaj la abonprezo apenaŭ kovras la kostojn de presado, redaktado, distribuo kaj afranko. Ĉu estas peko se UEA postulas ke ĝi almenaŭ ricevu la abonkotizon de la abonantoj kiuj plej verŝajne ĉiuj pagis, sed bonfide pagis al instanco, kiu ne plu prizorgas kaj eldonas la revuon?

Estas ĝuste, ke UEA pretis likvidi la tutan aferon je sumo de proksimume 12.000 guldenoj, tiel fordonacante ĉirkaŭ 3.500 guldenojn, sed eĉ tiu sincera kaj malavara gesto ne havis la deziratan efikon.

Mi sincere esperas, ke tiu ĉi letero kaj la en ĝi menciitaj faktoj kaj ciferoj, unufoje por ĉiam silentigos tiujn kiuj maljuste kaj malprave kulpigas la Estraron kaj la Komitaton de UEA.

Sincere via,
E. L. M. Wensing

Novaj programoj en nacilingvaj elsendoj

ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la oktobran eldonon.

SVISA RADIO. La vesperaj programoj jaŭde kaj sabate estas nun dissendataj per ondoj 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.27 m (9595 kcs), 25.25 m (11880 kcs) je la kutima horo 21.50. Neniu ŝanĝo pri la tagmeza elsendo lunde kaj merkrede.

POLA RADIO en Varsovio. Tri ĉiutagaj duonhoraj programoj estas nun dissendataj. Tempoj kaj ondlongoj estas menciitaj en la radio-rubriko de novembro. Krome la programoj en la angla, germana kaj itala lingvoj nun entenas "Anguleton por esperantistoj" konsistantan el informoj pri la Esperanto-movado, intervjuoj kun esperantistoj, lingvaj rubrikoj, Esperanto-kantoj, ktp. La programoj, kiuj entenas tian "anguleton" estas jenaj: angla-lingva programo merkrede inter 11.00 kaj 11.25 per ondoj 25.34 m (11840 kcs), 19.64 m (15275 kcs); germanlingva programo ĉiutage escepte dimanĉon 07.30 kaj 08.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs); itallingva programo merkrede inter 12.00 kaj 12.25 per ondoj 25.42 m (11800 kcs), 19.71 m (15215 kcs), la saman tagon inter 21.00 kaj 21.30 per ondoj 50.25 m (5970 kcs), 41.18 m (7285 kcs), kaj dimanĉe inter 11.30 kaj 12.25 per ondoj 25.42 m (11800 kcs), 19.71 m (15215 kcs). La daŭrado de tiuj "anguletoj" dependos de la nombro de alvenantaj korespondaĵoj kun rimarkoj pri la enhavo de la programoj, kun sugestoj kaj proponoj, aŭ nur kun la simpla konfirmo de la aŭskultado. Korespondaĵojn en Esperanto aŭ en la angla, germana, itala lingvoj oni adresu al: Pola Radio, Varsovio, Pollando.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 418, 1 novembro 1968

INTERNACIAJ KONKURSOJ 1968

Stato je la 31-a de oktobro 1968

Konkurso I

Pozicio	lando	kvoto	poentoj	%
1 (1)	Jugoslavio	3792	4600	121,31
2 (2)	Italujo	3816	3785	99,19
3 (3)	Japanujo	3829	3675	95,98
4 (4)	Svedujo	6415	6053	94,36
5 (7)	Usono	4144	3883	93,70
6 (5)	Nederlando	5322	4905	92,17
7 (6)	Danlando	2764	2520	91,17
8 (9)	Britujo	6095	5362	87,97
10 (10)	Germanujo	6579	5520	83,90
11 (11)	Hispanujo	2919	2440	83,59
12 (12)	Francujo	7234	6001	82,96
13 (13)	Svislando	1949	1590	81,58
14 (14)	Finnlando	2608	2105	80,71
15 (15)	Brazilo	3188	2459	77,13

Konkurso II

1 (1)	Grekujo	250	407	162,80
2 (2)	Israelo	488	630	129,10
3 (3)	Kanado	955	1025	107,33
4 (4)	Aŭstrujo	1270	1220	96,06
5 (6)	Aŭstralio	1327	1199	90,35
6 (5)	Sud-Afriko	250	225	90,—
7 (7)	Argentino	693	593	85,57
8 (11)	Nov-Zelando	1265	1011	79,92
9 (8)	Belgujo	1912	1675	87,60
10 (9)	Madagaskaro	250	187	74,80
11 (10)	Islando	250	165	66,—

La Internaciajn Konkursojn partoprenas tiuj landoj, el kiuj oni povas libere aliĝi al UEA. Poentoj estas aljuĝataj laŭ nombro de membroj, jene: AM = 1; MJ kaj J-MJ = 5; MA, MA-K kaj J-MA = 10; MS = 15; Patrono kaj DM = 50. La kvoto estas la meza poentaro atingita en la lastaj 5 jaroj. Interkrampaj ciferoj indikas la pasintmonatajn poziciojn. Varbu membrojn!

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Reularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de februaro neniuj membroj protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Britujo: Muriel L. Roberts. **Francujo:** Marcel Cuené, André Charras. **Germanujo:** Josef Weichsel, Ĥristo Paŝkulev. **Hispanujo:** Nicolás Lopez Escartin. **Irano:** Badiollah Saminy. **Israelo:** Josef Margoŝes. **Italujo:** Giancarlo Sartorio. **Pollando:** Witold-Adam Mazurkiewicz. **Rumanujo:** Harald Lurtz. **Svedujo:** Viktor Karlsson, Axel Anderson, Lars Andersson, Egon Eek. **Urugvajo:** Viktor Luis Cao, Rómulo Zeballos Morales. **U.A.R.:** Nassif Isaac.

Oficiala informilo

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1968)

Aŭstrujo: Graz (FD Geofiziko, Studentaj aferoj), Klosterneuburg. **Belgujo:** Charleroi (VD, FD Tekniko de vendado), Liège (D, FD Industrio: trinkaĵoj), Verviers (FD Turismo). **Bolivio:** La Paz. **Brazilo:** Baturité (D), Bela Vista, Belo Horizonte (FD Religio: Evangelia kristanismo), Brasília (FD Komerco), Caratinga (FD Rotario), Fortaleza (FD Religio: Adventista), Limoeiro do Norte (FD komerco), São Lourenço (VD), São Paulo (FD Historio: brazila, Literaturo), Sorocaba. **Britujo:** Huddersfield (FD Vegetarismo), Leeds. **Bulgarujo:** Asenovgrad, Burgas, Jambol, Sofia (FD Matematiko, Plastikaj artoj), Zahari Stojanovo, Zimnica. **Ĉeĥoslovakujo:** Břeclav, Orlová, Plzeň (FD Matematiko). **Ĉilio:** Santiago. **Finnlando:** Helsinki (VD Jokinen, FD Ĵurnalismo, Sporto), Jokela, Joroinen, Kokemäki (FD Filatelo). **Francujo:** Bourbon-l'Archambault, Caudevan (FD Virinaj Aferoj), Fontenay-aux-Roses, Grenoble (FD Religio: katolikismo), Lyon (JD), Menton, Paris (VD Cherpillod, FD Lingvoj: hebrea, Stenografio), Pontoise, St. Maurice-d'Etelan, Toulouse (VD), Yzeure (FD Edukado). **Germanujo:** Neunkirchen, Opladen, Urach. **Nederlando:** Driebergen-Rijsenburg. **Nov-Zelando:** Christchurch (FD Komerco, JD). **Soveta**

Unio: Moskva (FD Tokarev), Odessa, Omsk (VD, JD, FD Poezio), Tallinn (D, FD Koooperado). **Svedujo:** Gisebo (D).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Günther, s-ro F., Rockenhausen, Germanujo. Kaukal, s-ro W., Neustadt, Germanujo. Sladeček, s-ro Vlado, Ostrava, Ĉeĥoslovakujo. Ziegler, s-ro Bernd, Gimmeldingen, Germanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1968

284 Santos, d-ro Hyzo Gondeberto dos, Brazilo. 285 Sahatdjian, s-ro A., Francujo. 286 Donovan, s-ro Walter J., Nov-Zelando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1969

1 Epstein, s-ro Felix, Germanujo. 2 Wensing, s-ro E. L. M., Nederlando. 3 Donovan, s-ro W. J., Nov-Zelando. 4. Perray, s-ro Marcel, Tajlando. 5 Culbert, d-ro Sidney S., Usono.

DONACOJ (Gld.)

Generala Kaso: Belgujo: Demesmaeker, s-ro L., 35,61. Hispanujo: Enriquez de Salamanca, s-ro A., 1,25. Kanado: Henderson, s-ro, 3389,80. Svislando: Bierhoff, s-ro Fr., 21,80; Greutert, s-ro K., 10,74.

Donaco por la revuo "Esperanto": Islando: Tryggvason, s-ro B., 100,—.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

ANONCETOJ



Arne Bengtsson, Svedujo.

Tarifo: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkuponon por ĉiu duo da vortoj. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, 5594 Strib, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj handikapitojn de tuta mondo. U.I.E.A. estas kunlaboranta fakasocio kun UEA.

La Esperantista Kolektanto... reaperas, petu specimenon kaj sendu tekston por senpaga anonco al s-ro R. Melo, 15 rue de la Richelandedière, 42 St. Etienne, Francujo.

S-ro Mehmet Telyakar, 29-jara, deziras edziĝi kun riĉa fraŭlino el la libera mondo. Adreso: Aydinlik Sokak 23, Ortaköy-Istanbul, Turkujo.

Foiro de Barcelona sendos du afiŝojn kun Esperanta teksto al ĉiuj, kies nomoj troviĝas en la Kongresa libro de la 53-a U.K. en Madrid. Tiuj, kiuj ne estas en ĝi sed tamen deziras ricevi la afiŝojn, bonvolu skribi al Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428, Barcelona, Hispanujo, kiu tuj je la ricevo de la mendoj sendos la afiŝojn al vi.

Posedantoj de hebrea-esperanta vortareto kaj lernolibro de Gureviĉ, 1890, 38 paĝoj, bonvolu skribi al Holzhaus, 2748 Orchard Lane, Columbus, Indiana, Usono.

Korespondas pri literaturo, arto, religio kaj filozofio. S-ro Arne Bengtsson, Åbybergsgatan 32, Mölndal, Svedujo.

Letervespero okazos fine de januaro en Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428, Barcelona, Hisp. Sendu la poŝtkarton, kiu plej bone karakterizas vian landon: ni rekompencos per la plej bela poŝtkarto eldonita okaze de Espe-



Golić, Jugoslavio

ranto-kongreso.

Por kunmeti terminaron pri aŭtomata informtraktado fondiĝos laborgrupo. Nepran peton al fakistoj kaj specialistoj por partopreni. Bv. skribi al: P. A. Buijnsters, Gagelstraat 16, Eindhoven, Nederlando.

Fraŭlo, Nikola Golić, Trojstvo, Hrvastka, Jugoslavio, deziras korespondi kun gesamideanoj ĝis 35-jaraj el tuta mondo. Precipe kun fraŭlinoj. Ŝatas muzikon kaj turismon. Fraŭlinoj kunsendu siajn fotojn. (Celo: sincera kaj firma amikeco).

Barnaula E-klubo petas sendi infandesegnaĵojn por ekspozicio, aranĝota en komenco de 1969. Rekompenco per desegnaĵoj de siberiaj infanoj aŭ laŭdezire. Esperanto-klubo, p.k. 11, Barnaul-99, USSR.

S-ro Raif Markarian fariĝis estro de duagrada lernejo en Londono, kaj ekde la 1-a de decembro lia adreso por ĉiuj komunikaĵoj estas: 87 Sebastian Ave., Shenfield, Brentwood, Essex, Britujo.

Per leĝo n-ro 3.316 de 18.9.1968, la urbestro de Curitiba konsideras Esperanto-Asociacion Paranā kiel publikan utilecon. Bonvolu sendi gratulleterojn al "Vereadora Senhora Maria Clara Tesserolli, Câmara Municipal, Curitiba, Paranā, Brazilo", al kiu ni ŝuldas tiun projekton.

Preĝejbildkartojn deziras (dankrespondo garantiita!): S-ro Gösta A. Erikson, Bondegatan 21, 702 25 Örebro, Svedujo.

Ĉeĥa junulo, kiu je nia kontento laboris en nia bieno, ŝatas en la unuaj monatoj de 1969 fari agrikulturajn laborojn en Francujo, Germanujo, Svedujo aŭ alia Eŭr. lando, ĉe familio, de kiu almenaŭ unu scias Esperanton. Informojn ĉe fam. Groeneweg, Oudendijk 5, Goudswaard (Ned.)



Unesteno

Universala Esperanta Stenografio

Neprafo por ĉiu

Mondo, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich

Jus aperis en eldono de UEA nova

FOTO-POŝTKARTO

kun portreto de la iniciatinto de Esperanto

D-RO L. L. ZAMENHOF

La portreto estas fotografaĵo lastatempe retrovita kaj, ŝajne, antaŭe nekonata. Konvena kiel nov-jara salutkarto.

Formato: 90 × 140 mm. Prezo: po 0,30 gld. (1,2 steloj), plus afranko 10 %. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

K
O
N
T
A
K
T
O

SEN PAGE

vi ricevos la junularan revuon

Kontakto

dum 1969, se vi pagis kiel MA
kaj naskiĝis en 1944 aŭ poste.

Tuj informu nin pri la dato de
via naskiĝo !

K
O
N
T
A
K
T
O

POR LA JARFINA SEZONO

Serio de 6 bondezirokartoj "MONDFAMAJ
PENTRAĴOJ" (Rembrandt, Da Vinci, Breughel,
Renoir, Van Gogh, Utrillo), duoblaj kartoj,
kun kovertoj.

Prezo: 3,75 gld.; 15 steloj

Mendu tuj ĉe la Centra Oficejo, Nieuwe
Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

MENDU LA BINDITAJN KOLEKTOJN DE MONDA KULTURO

Bela kaj fortika, dukolora bindo kun ora sur-
preso. Poezio, noveloj, priartaj artikoloj, ĉiam
legindaj. Tre konvenaj kiel donacoj, ĉu unuope,
ĉu kune.

Vol. 1 (1962-64), 288 + 36 p., 27 × 19 cm.

Vol. 2 (1965-66), 168 + 24 p., 30 × 21 cm.

Prezoj: ĉiu volumo po 19,— gld.
inkluzive afrankon

Libroservo de UEA

Ne forgesu

LA TAGON DE LA HOMAJ RAJTOJ:

10 DECEMBRO

Distribuu la Esperantan tekston de la Univer-
sala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kies kvara
eldono jam aperis.

Vi pagas nur la sendokostojn: por 25 ekz. 2
int. respondkuponojn (0,90 gld); por 50 ekz. 4
rpk.; por 100 ekz. 6 rpk.; por 200 ekz. 8 rpk.

Mendu ĉe la Centra Oficejo de UEA

"LA PRAKTIKO" MODERNIĜAS...

Ĉu vi jam (re)abonis al "La gazeto, kiu instruas
kaj amuzas" por la venonta jaro 1969?

Ekde la januara numero de la nova jaro, "La
Praktiko", nun jam kvin jarojn eldonata de
UEA, prezentiĝos sub nova, modernstila kovrilo.

Se vi ne jam pagis la abonon 1969, vi povas
oportune uzi la mendo-folion enmetitan en la
novembran "Esperanto"-n.

Abonkotizo "La Praktiko" = 12 gld. jare.

Helsingör

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj de la
venonta somero okazos 20.-26. de julio en La
internacia Altlernejo de Helsingör. Venu por
ĝui belan feriosemajnon en vere Esperanta
rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj
Danlando

NB. Speciala karavano el Helsingör al UK en
Helsinki estos aranĝita. Ekiro 26/7 matene,
alveno al Helsinki tagmeze.

GEPATRA BULTENO

sub aŭspicio de UEA



Forumo kaj helpilo por gepatroj, kiuj instruas Esperanton al siaj infanoj. Subtenu ankaŭ vi ilian gravegan agadon per via abono! Aperas kvaronjare, bele multobligita kaj ilustrita. Redaktas Derrick P. Faux. Jarabono: 3,50 gld. (8 ŝil., 14 st.). Peranto: UEA.

Sendante jarfinajn donacojn aŭ salut-kartojn,

ornamu viajn sendaĵojn

per la bela trikolora glumarko de la

Jaro de Homaj Rajtoj 1968



La alloga desegno ora-oranĝa-malhelblua portas la sloganon: POR LA INTERNACIA LINGVO — KONTRAŬ LINGVA DISKRIMINACIO.

Mendu tuj por ne malfrui !

Prezo: po 0,50 gld. (2 st.) por 10 markoj, plus afranko 10 %. Eldonis: UEA.

Donacu libro-kartojn !

En multaj landoj ekzistas la bona kutimo donaci libro-karton aŭ libro-kuponon al siaj amikoj. La donacanto pagas iun sumon da mono al libro-vendejo kaj ricevas interŝanĝe specialan karton je tiu sama valoro. La karton li tiam sendas kun salutoj aŭ bondeziroj al iu amiko aŭ parenco. Tiu lasta, siavice, povas uzi la karton por aĉeti libron laŭ sia propra gusto kaj elekto.

Ĉi-jare la Libroservo de UEA ebligas, ke ankaŭ por Esperantaj libroj tiu metodo estos uzebla. Ĝus aperis specialaj, elegante presitaj donaco-kartoj je valoro de po 5,— guldenoj (20 steloj). La kartojn oni povas aĉeti kaj uzi ĉe la Libroservo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando). Oni pagas nur la efektivan valoron (5,— gld.) plus sendokostoj (10%). La kartoj havas la oportunan formaton A6 (105 × 148 mm).

Ĉu vi foje cerbumis, kian donacon sendi al via korespond-amiko eksterlanda? Kiel scii, kion li jam posedas, aŭ kiujn librojn li jam legis? La donaco-karto de UEA solvas tiun problemon! Via amiko povos mem elekti el mil diversaj eblecoj: libron, diskon, gazetabonon aŭ ion ajn mendeblan ĉe la Libroservo de UEA, ĝis la valoro de 5,— gld. (aŭ pluroble 5,— gld., se vi sendos plurajn kartojn).

Anticipe al la unua-foja Semajno de Internacia Amikeco (16-22 februaro, 1969) UEA jam pretigis similajn donaco-kartojn ankaŭ kun la speciala teksto "Kun bondeziroj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco".